

Internacia Muzea Seminario en Svitavy

La 16-an de septembro 2018 okazis en Esperanto-muzeo en Svitavy Muzea seminario dediĉita al 100-jariĝo de Ĉeĥoslovakio. La seminarion preparis organiza teamo de lokaj esperantistoj kunlaborante kun gvidantoj de ĈEA. Enkonduke Pavla Dvořáková elektis el malnova Esperanto-gazetaro kelkajn historiajn faktojn el la 1930-jaroj, Vlastimil Kočvara el Opava prelegis pri Esperanto-movado en Ostrava regiono, Ján Vajs proksimigis „Aktivecoj de ĉefaj esperantistoj en la intermilita periodo“, Miroslav Malovec informis, kion li malkovris pri Esperanto en Ĉeĥoslovakio

parolis pri spertoj kun ciferecigado de dokumentoj. Post unuopaj prelegoj la partoprenantoj diskutis, sed mankis tempo por profundaj analizoj de historiaj momentoj en



Miroslav Malovec prezentas sian temon



Bela konstruaĵo, kie troviĝas la Muzeo

en la 1950-aj kaj 1960-aj jaroj en tiutempaj gazetoj, pri ĝemeliĝo inter Eo-klubo en Jihlava kaj Martin en 1963 – 1968 prezentis Mária Pilková. En lasta parto de la seminario Vladimír Türk kaj László Szilvási

Esperanto-movado dum komuna respubliko. Nun estas stafeto de organizo de historia seminario sur slovakia flanko. La plej bona okazaĵo estos semajnfino de la 14-a ĝis la 16-a de decembro 2018, kiam en Liptovský Mikuláš renkontiĝos esperantistoj por festo de Esperanta Libro. En la historio de Esperanto-movado estas multaj nekonataj, sed



Prezentado pri la historio de la Muzeo

gravaj momentoj por ĝia evoluo. Estus bone, se pluaj esperantistoj-veteranoj partoprenos la planitan seminarion.

J. Vajs

Fotoj: Aŭtoro